


BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 102, Marto 2019



MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA VIRINA TAGO, 8 MARTO 2019

Universala Esperanto-Asocio salutas la virinojn de la mondo, precipe la anojn de la Esperanto-komunumo, okaze de la Internacia Virina Tago 2019. En sia rolo kiel internacia lingvo laboranta por rekta kaj nefiltrita dialogo inter la civitanoj de la mondo, Esperanto unike situas por ĉie helpi virinojn interkomunikiĝi trans la bariloj de distanco kaj lingvo, interŝanĝi vidpunktojn kaj ideojn, kaj organizi sin por agado favore al virinaj rajtoj.

Ni rekonas, ke multo farendas. Spite signifan progreson en Celo 4 de la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kiu rilatas al edukado, virina edukado postrestas la viran. Al tro multaj infanoj mankas aliro al edukado, kaj tio precipe veras inter knabinoj. El inter tiuj infanoj kiuj

havas aliron al edukado, tro multaj knabinoj frue forlasas la lernejon, antaŭ ol ili povas evoluigi la proprajn lertojn aŭ pretigi sin por karieroj.

Je la sama tempo, UEA rekonas kaj honoras la gvidan rolon de virinoj en movadoj por lingva kaj kultura revivigo, kaj por ŝirmi la endoman sferon kontraŭ subpremo kaj diskriminacio. Tiaj iniciatoj formas esencan parton de la strebado starigi mondon kie multaj kulturoj kaj lingvoj povu harmonie kunekzisti – temo speciale grava en la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, kaj aparte grava por nia Asocio kiu laboras por lingva egaleco.

Sekve, ni esprimas nian solidarecon kun movadoj por forigi diskriminacion kontraŭ virinoj kaj knabinoj kaj krei daŭripovan estontecon kiam ĉiuj homoj traktiĝas kun egala atento kaj respekto, sendepende de lingvo, kulturo, genro, kaj aliaj formoj de diverseco.

Okaze de la Internacia Virina Tago 2019, UEA sendis la ĉi-supran mesaĝon al Unuiĝintaj Nacioj. Pliajn detalojn pri la rilatoj UEA/UN vi trovos ĉe www.esperantoporun.org.

Estraro de REU decidas

RUSIA ESPERANTISTA UNIO PROKOKOLO № 18 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 14.03.2019

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Pri la Regularo de la reta grupo “REU” en la socia reto “VKontakte”.

DECIDO

1) Akcepti la Regularon de la grupo “REU” en la socia reto “VKontakte” (Propono de A.Mitin).

2) Komisiono al Aleksandr Mitin esti ĉefadministranto de la reta grupo “REU” en 2019.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 6;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

Regularo de la reta grupo “REU” en la socia reto “VKontakte”.

Celoj

La grupo “Rusia Esperantista Unio (REU)” en la socireto “VKontakte” estas formo de publika kunlaboro inter REU kaj rusiaj esperantistoj. La grupo “REU” celas:

- informadon pri la aktuala agado de REU: la Estraro de REU, asociitaj membroj, regionaj organizaĵoj kaj kunordigantoj, urbaj reprezentantoj, individuaj membroj;
- konatigon de esperantistoj de VK pri la Statutaj celoj kaj taskoj de REU;
- instigadon de esperantistoj al aliĝo al Rusia Esperantista Unio konforme al unu el membrokategorioj;
- informadon pri ĉefaj novaĵoj de la tuta esperantista movado por helpi al ĉiu interesiĝanta esperantisto trovi sian niĉon en la movado

Administrado

Administrantoj de la grupo estas membroj de la Estraro de REU.

Administranto de la grupo aŭtomatike estu ĉiu estrarano de REU, se li/ŝi havas paĝon VK kaj membras en ĉi-paĝo. La Estraro de REU rajtas komisii la administradon de la grupo al ne-estrarano.

Publikigo de novaĵoj

Ĉiu uzanto de la grupo rajtas proponi siajn novaĵojn. Administrantoj decidas pri konveneco aŭ malkonveneco de afiŝataj materialoj.

La prioritataj tipoj de novaĵoj estas:

- informoj de la Estraro de REU;
- novaĵoj pri la funkciado kaj agado de REU;
- anoncoj de “Bulteno de REU” kaj aliaj eldonaĵoj de REU;
- novaĵoj de REU-membroj pri aferoj rilataj al Esperanto kaj esperantista movado;
- informoj pri la Esperanto-instruado kaj aktualaj Esperanto-kursoj en Rusio;
- informoj pri gravaj Esperanto-renkontiĝoj kaj aranĝoj, organizataj de REU-membroj, aŭ internaciaj programoj kaj aranĝoj, kiujn povas partopreni la membroj;
- anoncoj pri internaciaj aranĝoj, programoj kaj projektoj, kiujn povas partopreni rusianoj (ekzemple, literaturaj konkursoj k.t.p.).

En la grupo povas esti publikigataj ankaŭ:

- ĉiuj aliaj novaĵoj, rilataj al la temo “Esperanto en Rusio”;
- informoj pri agado de rusiaj esperantistaj kluboj;
- gravaj novaĵoj de internaciaj kaj fremdlandaj Esperanto-organizaĵoj;
- informoj pri ĉiuj Esperanto-renkontiĝoj en Rusio kaj aliaj landoj;
- informoj pri Esperanto-eldonaĵoj de Rusio kaj aliaj landoj;

Pri publikigo de la novaĵoj decidas la administrantoj de la grupo.

Oficialaj lingvoj de la grupo estas Esperanto kaj la rusa.

- Esperanto estas prefera lingvo por movadaj novaĵoj;
- informo por komencantoj prefere estu en la rusa aŭ posedu sinsekve tekstojn en la rusa lingvo kaj en Esperanto;

Diskutoj

La listo de tipoj de la prioritataj kaj eblaj novaĵoj same konvenas al diskutoj en speciala sekcio de la grupo.

REU-anoj en Akademio de Esperanto



Ni gratulas la dumvivan membron de REU **Valentin Melnikov** (Moskvo) pri elekto al AdE por periodo ĝis 2028 jaro kaj amikon de REU **Tatjana Auderskaja** (Odeso) pri elekto al AdE ĝis 2022 jaro. Sukcesan laboron por stabiligo kaj evoluigo de la Lingvo Internacia surbaze de Fundamento de Esperanto!

Estraro de REU



Noto. En Rusio ĝis nun troviĝis 4 akademianoj: Sergio Pokrovskij (Novosibirsko), Aleksandro Melnikov (Rostovo-sur-Dono), Paŭlo Moĵajev (Simferopolo), Nikolao Gudskov (Moskvo). Krome, ekster Rusio (en Usono) estas du akademianoj (ambaŭ en Usono) – niaj eksaj samlandanoj: Boris Kolker (dumviva membro de REU) kaj Aleksandro Ŝlafer. Do, reprezento de rusiaj esperantistoj kaj membroj de REU (ĉu en aŭ ekster Rusio), en la ĉefa nia lingva instanco, estas sufiĉe rimarkinda.

Raporto pri spezoj de la kaso dum la jaro 2016

Aleksandr Lebedev ekoficis kiel kasisto de REU la 28-an de decembro 2015. En la lastaj tagoj de la 2015-a jaro venis kelkaj kotizpagoj — ili estas enkalkulitaj ĉi tie al la enspezoj de la 2016-a jaro.

Komenca sumo en la kaso: 0,00 ₺

Enspezoj

Titolo	Sumo, ₺
Inviduaj kotizoj	4 750,00
Klubaj kotizoj	22 100,00
Mecenataj kotizoj	1 300,00
Dumviva kotizo	5 000,00
De REU-libroservo	1 500,00
Sume, ₺	34 650,00

Elspezoj

Titolo	Sumo, ₺	Dato
Transdonita al la prezidanto	8 000,00	23.03.2016
Jara pago por la domajno reu.ru.	700,00	15.09.2016
Ĝiro al bankorarto de la prezidanto (10000 r. + ĝiropago 100 r.)	10 100,00	25.10.2016
Sume, ₺	18 800,00	

Enspezoj – elspezoj = 15 850,00 ₺

Transiras al la jaro 2017: 15 850,00 ₺

Pli detalan raporton eblas trovi en la paĝaro en la parto «Dokumentoj» aŭ elŝuti laŭ la rekta ligilo:

http://reu.ru/prenu/reu_kaso_2016_raporto.xlsx

Raporto pri spezoj de la kaso dum la jaro 2017

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2016: 15 850,00 ₺

Enspezoj

Titolo	Sumo, ₺
Inviduaj kotizoj	10 750,00
Klubaj kotizoj	19 650,00
Mecenataj kotizoj	1 500,00
Donacoj	750,00
Sume, ₺	32 650,00

Elspezoj

Titolo	Sumo, ₺	Dato
Ĝiro al M. Ĉertilov laŭ komisiono de la prezidanto	3 500,00	09.04.2017
Transdonita al la prezidanto	22 700,00	02.08.2017
Sume, ₺	26 200,00	

Enspezoj – elspezoj = 6 450,00 ₺

Transiras al la jaro 2018: 22 300,00 ₺

Pli detalan raporton eblas trovi en la paĝaro en la parto «Dokumentoj» aŭ elŝuti laŭ la rekta ligilo:

http://reu.ru/prenu/reu_kaso_2017_raporto.xlsx

Raporto pri spezoj de la kaso dum la jaro 2018

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2017: 22 300,00 ₺

Enspezoj

Titolo	Sumo, ₺
Inividuaj kotizoj	5 500,00
Mecenataj kotizoj	500,00
Klubaj kotizoj	13 400,00
Donacoj	1 000,00
Parta senŝuldiĝo de Valentin Seguru	25 000,00
AMo-44 — kotizoj	4 450,00
AMo-44 — profito	9 000,00
Sume, ₺	58 850,00

Elspezoj

Titolo	Sumo, ₺	Dato
112 € → al la prezidanto por pagi REU-kotizon al UEA	8 494,62	17.04.2018
70 € → al la prezidanto por aĉeti donacon al la Esperantisto de la jaro 2017	5 309,13	17.04.2018
Kovro de malprofito de RET-2018	15 640,00	09.07.2018
250 € → al la prezidanto por pagi al UEA por aligitaj membroj	18 116,48	14.07.2018
3500 ₺ + ĝiropago 35 ₺ → al la prezidanto por organizi invitilon far turisma firmao al la francino Francoise Noireau, kiu venos al Rusio.	3 535,00	06.08.2018
Pripago de la domajno reu.ru por la sekva jarperiodo	890,00	07.08.2018
→ al la prezidanto por aĉeti trajnbileton Moskvo — Sankt-Peterburgo por Fransuaza	1 251,20	01.10.2018
Elpagoj el REU-kontoj al membroj / laŭ komisiono de membroj	1 250,00	07.10.2018; 09.10.2018
60 € → al la prezidanto por aĉeti donacon al la Esperantisto de la jaro 2018	4 780,00	29.12.2018
Sume, ₺	59 266,43	

Enspezoj – elspezoj = -416,43 ₺

Transiras al la jaro 2019: 21 883,57 ₺

Pli detalan raporton eblas trovi en la paĝaro en la parto «Dokumentoj» aŭ elŝuti laŭ la rekta ligilo:
http://reu.ru/prenu/reu_kaso_2018_raporto.xlsx

Rezultoj de la esploro “Pri la grupo “REU” en la socia reto “VKontakte”

Meze de februaro 2019 la estraranoj Aleksandr Mitin kaj Vladimir Opletajev faris esploron pri la konsisto de la grupo “REU” en la socia reto “VKontakte” por verigi kaj optimumigi ĝian funkciadon. Cetere tiucele estas kreata regularo pri la grupo “REU” kaj al kelkdekoj da grupanoj estis sendita “Mesaĝo de la Estraro de REU” kun invito aliĝi aŭ re-aliĝi al REU (<http://reu.ru/paghoj/kotizoj2019.html>)


La grupo “REU” (https://vk.com/reu_vk) kun la promesplena kaj esperiga devizo “Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan” estis lanĉita la 13-an de marto 2018, rapide kreskas nombre kaj havas jam pli ol cent anojn. Ĉefadministranto de la grupo estas Aleksandr Mitin (Nijnij-Novgorodo). La grupo ne anstataŭas la oficialan paĝaron de REU kaj servas kiel formo de neformala kunlaboro kaj kontaktoj inter REU, membroj de REU kaj personoj ne aliĝintaj al REU sed interesigantaj pri ĝia agado.

Ni prezentas al vi kelkajn rezultojn de la esploro.


1. Aktualaj membroj de REU konsistigas nur 19% elcentojn de la tuta grupanaro. Kun konsidero de dume dormantaj pasintjaraj membroj evidentas rimarkebla atentinda rezervo por eventuala REU-membreco.

Aliĝi novajn membrojn al REU estas do unu el la celoj de la grupo “REU”. La elcento de “REU”-grupanoj inkluzive de eksterlandaj esperantistoj, kiuj ne membras en REU, estas sufiĉe granda (73%). Tion oni povas konsideri ĝenerala kaj pozitiva intereso de esperantistoj pri la agado de REU.


Bedaŭrinde nun ne eblas karakterizi la lingvan nivelon de la grupanoj, sed inter ili estas reprezentitaj ĉiuj kategorioj de lingvouzantoj: spertuloj, komencintoj, progresantoj i.a. multas ankaŭ memlernantoj.




2. La diagramo “Aparteno de grupanoj al REU” niaopinie povas demonstri certan fidelecon de multjaraj membroj al REU – tutlanda esperantista organizaĵo – kaj ilian subtenon de iniciatoj de la Estraro.



3. La dissendita mesaĝo de la Estraro de REU kun la alvoko al “REU”-grupanoj iĝi membroj de REU en 2019 kaŭzis plurajn respondojn, inter kiuj plimultas pozitivaj reagoj. Ili vekas optimismon kaj atestas utilecon kaj aktualecon de novaj formoj de la aktivado de la Estraro kaj de REU ene de la tutlanda esperantista komunumo.



4. Al la grupo “REU” aliĝis konsiderinda nombro de studentoj kaj lernejanoj, inter ili du knaboj estas membroj de REU kiel kandidatoj. Tiu ĉi kategorio de la grupanoj bezonas apartan apogon lingvan kaj movadan fare de pli spertaj samideanoj, des pli la realaj kondiĉoj, ligitaj kun la kontinua maljuniĝo de la esperantistaro, estas defio, postulanta pli aktivan atenton al jnuaj esperantistoj.



5. Konklude:

- la grupo “REU” en la socia reto “VKontakte” reale funkcias kaj kontinue evoluas;
- la Estraro de REU aprobas kaj subtenas ĝin kiel formon de neformala kunlaboro kun rusiaj esperantistoj;
- la “Regularo de la reta grupo “REU” estas verkata kaj afiŝota post la konfirmo fare de la Estraro;
- la administrantoj de la grupo “REU” salutas novajn aliĝantojn kaj petas ĉiujn “REU”-grupanojn esti aktivaj societanoj, proponi proprajn interesajn ideojn kaj novaĵojn, strebi al aktiva kunlaborado.

Aleksandr Mitin, Vladimir Opletajev
Februaro 2019

APERo-13 la plej surpriza

7-10.03.2019, Zvenigorod, la temo "Kredoj kaj miskredoj"



Estas ĉiam tre malfacile rakonti pri ĵuspasinta ampleksa aranĝo, kun multaj karaj homoj kaj dekoj da interesaj programeroj... Kiel elekti? Kiel priskribi abundajn impresojn, kiel transdoni konstantan senton de ĝuo, de kio komenci?

Bone... Plej facilas komenci de sekaj faktoj. Estu la statistiko.

La 13-an AntaŭPrintempan Esperanto-renkontiĝon de Moskva Esperanto-Asocio MASI partoprenis 35 esperantistoj kaj 4 familianoj-neesperantistoj, kiuj nur fragmente kaj silente partoprenis la programon.

El la 35 partoprenintoj 19 estis membroj de MEA MASI (8 aliĝis dum aŭ tuj post la APERo).

21 homoj estas loĝantoj en Moskvo (12) aŭ Moskva Gubernio (Ĉernogolovka, Dubna, Elektrostal, Jegorjevsk, Lesnoj Gorodok, Luberci, Narofominsk, Odincovo), 13 venis el aliaj regionoj de Rusio (urboj Arĥangelsko, Jaroslavlo, Jekaterinburgo, Granda Novgorodo, Novoĉerkasko, Penzo, Sankt-Peterburgo, Taganrogo, Volgogrado, Uljanovsko), estis 3 eksterlandanoj (el Ĉeĥio, Latvio kaj Ukrainio) – sume reprezentis 20 (!) urboj.

Ĉeestis 15 inoj kaj 20 viroj. 10 gejunuloj aĝis inter 14 kaj 35 jaroj, la plej juna ĉeestanto (ekster la esperantista listo) estis la 4-monata Kirill Ĵitĉenko, veninta kun la feliĉaj gepatroj, la plej aĝa partoprenantino estis 76-jara Valentina Miĥajlovna Spicina el u. Volgogrado. Sen kalkuli familianojn-neesperantistojn inter ni estis 11 unuafojaj APERo-partoprenintoj, 22 fluparolantoj, 11 parolantoj kaj 2 ekparolantoj. Jen tiel © Lingva Disciplino floris!

Nun kelkaj vortoj pri la programo.

APERo daŭre kaj kun plia profundigo inkludas al klerigaj programeroj. Kutimaj Esperantistaj aranĝoj nomas tiujn Somera Universitato, sed ni ne havas tiajn ambiciojn (pli ĝuste: ni ne havas fakulojn por fari universitatnivelaĵojn). Necesas nomi aferojn per konvenaj nomoj. Ni nomu tion – *ĝenerala klerigejo* (ĜK). Temo de tiu ĉi APERo, havanta mistikan numeron 13, estis "*Kredoj kaj miskredoj*". Ĝi invitis programerojn pri superstiĉoj kaj eksterraciaj konvinkoj, abundaj en nia ĉiutageco kaj ĝenerala mondpercepto. Elektante la temon, mi troviĝis sub influo de la numero 13 kaj de la ĵus legita sciencopopulara libro de unu el la plej sukcesaj en nuntempa Rusio popularigistoj de la scienco (Александр Панчин. «Защита от тёмных искусств. Путеводитель по миру паранормальных явлений». АСТ, CORPUS, 2018). Rezulte ni ekhavis kelkajn pensigajn programerojn, nome: tuja interpreto de la filmprelego de Aleksandr Panĉin "Выход из тела и околосмертный опыт" <https://www.youtube.com/watch?v=be35ir12Kv8>), prelegoj de Martin Bureš "Mi ne kredas! Ĉu ne evidentas, ke racio estas la ĝusta vojo?" kaj de Georgo Kevorkjanc "GMP: ĉu danĝeras?", debatoj far' de Ilja Gnuŝarjov "Ĉu animo ekzistas?", spertinterŝanĝo de Mikaelo Povorin "Sorĉado kaj ne nur: ĉu miraklo?" kaj du provokaj diskuttrondoj de Aleksandr Milner: "Tamen ĝi estas... plata!" kaj "Ĉu viroj estas homoj?"



Grava parto de la kleriga programo rilatis Esperanton. Ĉefrolis ĉi tie la gestudentoj de la Interlingvistikaj Studoj en Poznań MASianoj Ilja Gnuŝarjov kaj Tanjo Stepanova. Ili okazigis tri fakajn programerojn: du prelegojn ("Esperanto-literaturo kiel nia valoro" kaj "Interlingvistikaj studoj en Poznań") kaj Literaturo-kulturajn kvizojn.

Junjo Ŝkarbanj organizis por ni zorge preparitan "Filman ekskurson tra Ukrainio", kun postaj demandoj kaj donacetoj. Sufiĉe kleriga estis la hinda desegno sur la manoj, organizita de Mikaelo Abramoviĉ.



Ne malestis ankaŭ E-movadaj programeroj. Aleksandro Basov rakontis pri la vortaro de Boris Kondratjev kaj kiel eblas helpi ĝian progreson, ankaŭ pri la MASI-projekto en jutubo "Esperanto: первый канал". Li klarigis, kiel eblas kontribui tiun gravan laboron kaj ekzercigis homojn intervjui unu la alian. Alvorte mi diru, ke Aleksandro estas teknika organizanto de la tuta APERo, kiu sen liaj zorgoj apenaŭ povus okazi. Aparta kunveneto de gejunuloj estis dediĉita al la demandoj de restarigo de la junulara Movado en Rusio.

Kompreneble, multe ĝuigis ĉiujn tradiciaj programeroj: lingvaj ludoj de Mikaelo Povorin (Aldogramoj, Kunigramoj, Rebusoj kaj Proverba kvizo), intelekta ludo de Petro Fedosov "Kio? Kie? Kiam?", Interpretista konkurso kvarparta, preparita de Larisa Ŝapoŝnikova, Poezia Horo en kadre de la festeno de la 8-a de Marto, lerte organizita de Raja Kudrjavceva (kun

neforgeseblaj kontribuoj flanke de niaj afablaj kaj malavaraj viroj), aŭtoraj koncertoj de Sergio Straŝnenko, Mikaelo Povorin kaj Vadim Solovjov (novtradukitaj popularaj kantoj). Unu nokton ni sukcesis ne nur tabloludi, sed eĉ homlupumi!

Paralele kun la ĝenerala programo 4-foje mi gvidis iujn paroligajn okupojn por novicoj, sume dum 5, 5 horoj. Temis ne tiom pri la gramatiko, kiom pri komunikado inter nekonatuloj, aŭ ne havantaj antaŭe lingvan praktikon, aŭ dezirantaj ekhavi novan sperton pri instruado. Tion ni nomis “Esperanto parolata de novuloj” (EPN). Laŭ la impresoj de partoprenintoj tiuj kunvenoj estis por ili plaĉaj kaj utilaj. Laŭ mi, grava senco de EPN estas ebligi al novaj partoprenantoj komunikadon en Esperanto kaj ioman interkonatiĝon. Necesas konsideri tiun ĉi formaton ankaŭ por sekvaj APERoj.



Dum la duhora Malfermo la 7-an de marto – kun hisado de la flago, kantado de APERo-himnoj, amuzaj scenafetoj pri superstiĉoj – okazis speciala evento: la kvizo pri la naskiĝinto Sergeo Straŝnenko – fidela amiko de APERo, kiun li vizitis jam la 9-an fojon sinsekve.

La lasta horo de la APERo-13 estis dediĉita al impresoj... Kiaj? Demandu partoprenintojn! Kaj ne preterlasu APERon en la februaro-2020!

*Irina Gonĉarova,
kunordiganto de MEA MASI,
inicianto de APERo*

*Klubo de instruistoj
Bibliografio*

Katalogo de rusiaj Esperanto-lerniloj, verkitaj, eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusio ekde 1957

La kvara parto, la antaŭaj partoj aperis en BdR n-roj 99, 100 kaj 101

№	Aŭtoro	Titolo	Eldonejo, urbo	Eldon- jaro	Eldon- kvanto	Nombro de paĝoj	Mallonga referenca noto	Bitversio, reta ligilo
3 2	A.С. Мельников (Александр Сергеевич Мельников)	«Эсперанто для дотошных»	Издательство Ростовского института иностранных языков, Ростов-на Дону	2006	300	167	Часть I. Алфавит. Правила чтения и письма. Имена существительные. (На русском языке) Практика системита граматико де Esperanto kaj pritrakto de specifaĵoj de la Esperanto- kulturo.	

3 3	А.С. Мельников Aleksandro S. Melnikov (Александр Сергеевич Мельников)	«Ученье – без мученья» ГЛАВНЫЕ ПРИНЦИПЫ ОБУЧЕНИЯ ИНОСТРАННОМУ ЯЗЫКУ и практические советы для преподавателей курсов международного языка эсперанто». ISBN 5-8480-0212-6	Издательство Ростовского государственного педагогического университета, Ростов-на Дону	1999	-	95	“Instruado sen turmentado” estas didaktikaj materialoj por Esperanto-kursoj. En la libro estas prezentitaj cefaj principoj de fremdlingvo-instruado kaj praktikaj konsiloj por Esperanto-kursgvidantoj, ĝi estas helpilo por profesiaj kaj amatoraj Esperanto-instruantoj.
3 4	А.С. Мельников (Александр Сергеевич Мельников)	«Лингвокультурологические аспекты плановых международных языков» (Лингвистика и межкультурная коммуникация) ISBN 5-84-80-0036-0	Издательство Ростовского государственного педагогического университета, Ростов – на-Дону	2004	300	632	Monografio en la rusa lingvo destinita por studentoj de esperantologio kaj interesiĝantoj pri interligiteco de lingvo kaj kulturo, pri interlingvistiko, kulturologio.
3 5	Роже Эмбер, Иван Шполярец, Споменка Штимец, Златко Тышляр	«ЭСПЕРАНТО. Учебник международного языка». Tradukis kaj adaptis Aleksander Korĵenkov	“Sezonoj“, Kaliningrad	2003	1000	72	Ruslingva versio de Zagreba metodo de la Esperanto-instruado; 12-leciana baza kurso kun Esperanta – rusa kaj rusa – Esperanta vortaretoj, gramatika apendikso kaj koncizaj faktoj pri Esperanto kaj esperantista movado.
3 6	Абдурахман Юнусов (Абдурахман Гаджиевич Юнусов)	«Эсперанто? Это просто!» Учебник международного языка. ISBN 5-7161-0078-3	“Impeto”, Moskvo	2000	500	104	Baza kurso de Esperanto en la rusa lingvo kun Esperanta – rusa kaj rusa – Esperanta vortaretoj, destinita por kursoj kaj memlernado.
3 7	Абдурахман Юнусов (Абдурахман Гаджиевич Юнусов)	«Эсперанто? Это просто!» Учебник международного языка. Издание 2-е исправленное и дополненное ISBN 5-716-0082-1	“Impeto”, Moskvo	2001	1000	128	Korektita kaj kompletigita baza kurso de Esperanto en la rusa lingvo kun Esperanta – rusa kaj rusa – Esperanta vortaretoj, destinita por kursoj kaj memlernado.
3 8	Абдурахман Юнусов (Абдурахман Гаджиевич Юнусов)	«Эсперанто? Это просто!» Учебник международного языка. Издание 4-е ISBN 978-5-7161-0255-2	“Impeto”, Moskvo	2014	500	160	Korektita kaj kompletigita 20-leciana baza kurso de Esperanto en la rusa lingvo kun Esperanta – rusa kaj rusa – Esperanta vortaretoj, destinita por kursoj kaj memlernado.
3 9	Стано Марчек	«Эсперанто прямым методом» ISBN: 978-80 969667-2-1	“Impeto”, Moskvo	2007	500	114	Dulingva baza kurso de Esperanto, destinita por engrupa kaj memlernado ekde la aĝo de 10 jaroj. La libro estas kompletigita per

							kodisko kun modela prononco de tekstoj.
40	Владимир Григорьевич Гакаленко	Учебник эсперанто	http://tnu.podeli.se.ru/docs/index-314339.html https://www.rulit.me/author/gakalenko-vladimir-grigorevich/uchebnik-esperanto-download-free-213452.html				Dulingva lernolibro-informilo en bitformato, konsistas el 12 lecionoj kun ŝlosiloj por memkontrolo, destinita por aŭtodidakta lernado de Esperanto.
41	Борис Колкер (Борис Григорьевич Колкер)	“Esperanto en 16 tagoj”	http://www.esperanto.mv.ru/Esp16/X06.html	1999			Dulingva 16-leciona bitversio de la baza kurso de Esperanto, publikigita de la aŭtoro en la sovetia revuo “Kemio kaj vivo”.
42	Борис Колкер (Борис Григорьевич Колкер)	“Эсперанто за 10 часов Ознакомительный блиц-курс”	http://esperanto.mv.ru/Esp10/Esperanto_en_10_horoj.html	2016			Dulingva 10-leciona konciza gramatika informilo (fulmorkurso) pri Esperanto en bitformato, sen ekzercoj, kun tekstoj en ĉiu leciono, Esperanto-rusa vortareto. La kurso estas destinita por memlernado de Esperanto.

Por ĉi tiu parto de la katalogo (32 – 42) kunlaboris Vladimir Opletajev, Nikolaj Gudskov, Irina Gonĉarova.

Aranĝoj

4-a lingvotrejnado en Jekaterinburgo 1-4 de majo de 2019

Karaj geamikoj, la organiza grupo de la kvara lingvotrejnado invitas ĉiujn lernemajn esperantistojn por pliperfektigi siajn lingvokonajn kaj lingvokapablojn al la printempa kvartaga studprogramo en Jekaterinburgo!

En Jekaterinburgo sukcese okazis jam tri lingvotrejnadoj la unua – novembro de 2014, la dua – januare de 2016, kaj la tria – denove novembre de 2017. La kvara, ĉi-foje printempa, okazos dum majaj festoj, la 1-4 de majo de 2019.

Lingvotrejnado estas kultur-kleriga aranĝo, kiu esence estas intensa tri-kvartaga diversnivela lingvostudado kun variaj akcesoraj klerigaj kaj kulturaj programoj. Kiel kutime, la organizan grupon de la lingvotrejnado formas aktivuloj el diversaj urboj kaj estas invitataj Esperanto-instruistoj, posedantaj instruajn spertojn en la regiona, landa kaj internacia skalo.

Organiza grupo:

1. Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo) – Ĉefa kunordiganto kaj gvidanto de la programo.
2. Irina Gonĉarova (Odincovo) – Estrarano de REU, prizorganto de la instru-metodika kaj kleriga programoj por la nivelo C.
3. Aleksandr Blinov (Ĉeboksari) – prizorganto de la instru-metodika kaj kleriga programoj por la nivelo B.
4. Olga Ŝilajeva (Glazovo) – prizorganto de la instru-metodika kaj kleriga programoj por la nivelo A2;
5. Pavel Veselov (Tjumenjo) – komputila servo, interreto, pretigo de nomŝildoj, certigiloj.

La programo de la trejnado efektiviĝos en tri grupoj konforme al la niveloj A2, B1-2, C. Ĝi celas aktivigi lingvokonajn de esperantistoj, evoluigi iliajn bazajn lingvokapablojn: aŭda kompreno, parolkapablo, skribokapablo, legokompreno, trakti fonajn kulturajn kaj movadajn temojn.

La trejnado havas du kategoriojn de partoprenantoj: instruistoj kaj kursanoj. Instruistoj estas liberigataj de aliĝkotizoj. Baza aliĝkotizo por kursanoj – 1000 rubloj, por studentoj kaj pensiuloj – 500 rubloj, por infanoj (ĝis inkl. 14 j.) – senpage. Estas planate



okazigi en ĉiu grupo entute dek du 60-minutajn lecionojn. Ĉiuj kursanoj ricevos certigilon de la Organiza grupo pri partopreno en la lingvotrejnado.

La varia vespera programo kompletigos kaj daŭrigos la tuttagan studadon. Post la 18-a horo ĉiujn partoprenantojn atendas intelektaj, lingvaj kaj societaj ludoj, gvidataj de Roman Jefremov, lingvaj kaj parolkonkursoj, "Peĉa kuĉo", komuna koncerto, rakonto pri studado en Poznano en la fako pri interlingvistiko kaj Esperantologio, rakonto pri la festivalo "Teo kaj Amo" kun la spektado de elektitaj filmoj de la festivalo.

La Printempa lingvotrejnado-4 okazos en la sanigejo-profilaktejo "Bodrostj" (Jekaterinburgo, strato Krasnoflotcev, 48A). **Loĝado** en 2-litaj ĉambroj Provizora prezo (Loĝado kaj trifoja manĝado por unu persono diurne) estas 1500 rubloj. Pli detalaj informoj pri la prezoj aperos en sekva informletero.

Manieroj pagi la aliĝkotizon:

Bonvolu ĝiri vian kotizon, uzante iun el la subaj pagebloj.

1) Per poŝtelefona transpago (por la tenantoj de la kartoj "Sberbank Rossii": sendu sms al la numero 900 kun la teksto: "перевод 9224801151 XXX". Anstataŭ XXX skribu vian sumon (superepago 1%, se via karto produktita ekster Tjumena kaj Omska regiono).

2) Per bankaŭtomato/pagaŭtomato de la banko "Sberbank Rossii", "Sberbank Online" al la Karto numero 5336 6900 6074 8052 (telefonnumero +7 922 480 11 51), (superpago por la transpago estas 1 %, se vi transpagas ne el Tjumena regiono), transpago pere de bankoficisto – 2-3 %.

3) Per Yandex-mono al la konto kun la numero 4100143445779 (revo-tek@ya.ru) / +7 922 480 11 51). La sistemo mem indikos la superpagon, kutime 0,5%.

Vi povas transpigi kontante sen superpago pere de bankaŭtomato/pagaŭtomato de Sberbank aŭ pagaŭtomatoj de "Svjaznoj" aŭ aliaj (Vi povas viziti la paĝaron de la Yandex-mono)

Ne forgesu sciigi retroŝte la organizantojn pri la sendita de vi aliĝkotizo (nomo, dato, pagmaniero) al la adreso: lingvotrejnado@ural-sib.org

Por kontaktoj:

lingvotrejnado@ural-sib.org

Raja Kudrjavceva – poŝtelefono: +7-922-298-20-21, retadreso: komencanto.r66@ya.ru;

Pavel Veselov – retadreso: lingvotrejnado@ural-sib.org

Renkontiĝoj

TEMoj-2019

Jen la informo por tiuj, kiuj post TEMoj planas partopreni en UK:


El Sankt-Peterburgo (Finnlanda stacidomo) al Lahti ĉiutage iras kelkaj rapidtrajnoj "Allegro". Ni rekomendas al vi la plej komfortan vojaĝon: la 20-an je la 6-a matene starti al Sankt-Peterburgo per buso.

La buso venas al metrostacio "ulica Dybenko" antaŭ la 10a horo. De tie per metroo vi atingos la Finnlandan stacidomon post 40 minutoj. Je la 11.30 de la Finnlanda stacidomo startas rapidtrajno Allegro al Lahti, kiu venas al la stacidomo en la centro de Lahti posttagmeze, je la 14.09. Inter la ĝisnunaj aliĝintoj 8 presonoj anoncis sian partoprenon en UK. Se ĉiuj tiuj informos nin pri sia deziro veturi en Sankt-Peterburgon kune, ni mendos specialan buseton, kiu veturigos la grupon rekte al la Finnlanda stacidomo.

Do ni atendu la saman deziron de 8 aŭ pli multaj personoj. Tiuj personoj bv. reeĥi.

Pri la trajnbiletoj bv. zorgi memstare. Vendado de la biletoj por la 20-a de julio startas la 22-an de aprilo.

Respondojn al viaj demandoj vi povas ricevi ankaŭ ĉe <http://temoj2019.online/>



Kulturaj valoroj – senpage


6-LINGVA BIOLOGIA VORTARO: RUSA - LATINA -ESPERANTA - ANGLA - GERMANA - HISPANA NOMOJ DE FIŜOJ

<ol style="list-style-type: none">1. Аку́па (rus)2. Acipenser sp (lat)3. akcipenser (eng)4. Acara, Cichlid (eng)5. Blaupanzenbarusch (de)6. Acipenser (es)	
<ol style="list-style-type: none">1. Аку́ша (rus)2. Sarks (lat)3. Shark (eng)4. Haihaich (de)5. (ofimze) tounarste6. Tiburón (es)	
<ol style="list-style-type: none">1. АСШ-и карпиа (rus)2. Squatinus acanthias (lat)3. skvato (es)4. Pickard dogfish (eng)5. Dorschel (de)6. Mielga, Gallado (es)	

La reta vortaro, kompilita de **Tatjana Auderskaja**, estas libere atingebla rete: <http://vortaro.zzz.com.ua>
Jen kion skribas pri ĝi la aŭtorino:

La vortaro estas destinita unuavice por ruslingvanoj, kiuj volas diri, skribi aŭ verki ion pri fiŝoj; tial ni mencias precipe la fiŝojn, kiuj vivas en niaj maroj, riveroj, lagoj, kaj ankaŭ akvariajn fiŝojn. La fiŝoj maloftaj aŭ nekonataj en nia lando kutime konservas ankaŭ en la rusa lingvo siajn latinajn nomojn, kaj la aŭtoro ne opinias, ke estas necese indiki ilin. Se ekzistas aŭ havas grandan signifon kaj estas vaste konata nur unu reprezentanto de la genro, ni indikas la genron kaj

specion; se estas multaj, ni mencias nur la genron kun aldono de sp. (diversaj specioj) Post la rusa nomo staras latina nomo kaj Esperanta nomo, poste sekvas la nomoj angla, germana kaj hispana. Nomoj de fiŝoj estas sufiĉe modere prezentitaj en PIV; tial multaj ĉi tie estas proponataj de la aŭtoro; parte ili estas prenitaj el la valora libro de Aleksandr Ŝevĉenko "Ilustrita Enciklopedio de akvariaj fiŝoj", Moskvo, Impeto, 2007. Tiaj novproponitaj nomoj estas signitaj per asterisko*.



La februara *Ondo* senpage elŝutebla

La redakcio de *La Ondo de Esperanto* decidis senpage disponigi la februaran *Ondon* al ĉiuj dezirantoj konatiĝi kun nia bitgazeto. La ampleksa, 78-paĝa februara eldono estas libere elŝutebla laŭ la normoj "pdf" kaj "ePub" en nia elektronika biblioteko

<http://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>

En ĉi tiu kolekto nun estas 23 eldonaĵoj: 16 senpage elŝuteblaj bitlibroj, du aĉeteblaj bitlibroj, kaj kvin numeroj de *La Ondo de Esperanto*.

Poezia konkurso

Al atento de verkemuloj, poetoj kaj ĉiuj interesotoj:

Ni altiras vian atenton pri "La konkursoj de Samideano 2019", kiuj estas jam tre famaj en la E-mondo.

Ni petas al vi disvastigi inter viaj klubanoj kaj aliaj homoj aŭ asocioj, kiuj povus esti interesataj, nian novan retejon <https://www.iconcorsidisamideano.it>.

La retejo enhavas eĉ blogon, kiu akceptas bonkvalitajn artikolojn ankaŭ en Esperanto kaj ni estus feliĉaj ricevi tekstojn el vi kaj viaj klubanoj.

Ni atentigas pri ĉi tiuj skribaĵoj <https://www.iconcorsidisamideano.it/sicilia-esperantista-esperantista-sicilio/> kaj

<https://www.iconcorsidisamideano.it/2019/01/20/samideano-sin-rakontas>,

pri kiuj ni ŝatus ricevi viajn reagojn.

Por la Prezidantado de Esperantista Sicilio



Nicola Morandi



Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "RUSIA ESPERANTISTA UNIO"
BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj)
Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio